Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)
**MondaFest' • La Monda Festivalo de Esperanto • 20 junio – 20 septembro**

# Festivala Kuriero

**13-a de aŭgusto 2020, numero 12**
Redaktas Dmitrij Ŝevĉenko kaj Anna Striganova

## Ni aŭskultu la indiĝenojn de nia mondo: indiĝenaj voĉoj en la Monda Festivalo de Esperanto

Okaze de la Internacia Tago de la Indiĝenaj Popoloj de la Mondo, la 9-a de aŭgusto 2020, la Monda Festivalo de Esperanto (MondaFest' 2020) proponis al la publiko kelkajn videojn kaj legaĵojn.



Detalajn informojn kaj ligilojn kie spekti kaj legi la materialojn trovu ĉe la Eventa Servo kaj la Reta Revuo: https://revuoesperanto.org/indigxenoj.

## La Oratora Konkurso de UEA okazis rete. La rezultoj




**La ĵurianoj**

Ĉi-jare okazis la unua reta versio de la Oratora Konkurso dum la Virtuala Kongreso de Esperanto kadre de Monda Festivalo 2020. Ses kandidatoj proponis sin. La 5-an de aŭgusto kvin el ili povis prezentiĝi.

La trian premion gajnis **Michael Boris Mandirola**:




La duan premion ricevis **Raoni Sousa**:




La unua premio estas aljuĝita al **Siru Laine**, el Finnlando, nun loĝanta en Barcelono:




La Komisiono ankaŭ honore mencias la prezenton de Rogier Huurman, kromnome Roĉjo.

### Gratulon al ĉiuj!

Pliajn detalojn vi povos trovi en la septembra numero de la revuo *Esperanto*.

# VEA prezentas sin

Hoan Tran

La 8-an de aŭgusto okazis prelego de Vjetnama Esperanto-Asocio (VEA) dum la Virtuala Movada Foiro de la Virtuala Kongreso de Esperanto. La programeron kungvidis Phuong Mai, Vic-prezidanto de VEA, kaj Hoan Tran, VEA-estrarano respondeca pri Informado kaj Edukado.



La VEA-reprezentantoj resumis la historion de sia Asocio kaj raportis pri la aktivaĵoj de vjetnamaj esperantistoj ĝis nun. El tiuj agadoj malfermo de Komuna Kunvenejo de Esperanto kaj 2 kursoj de Esperanto en la vjetnama ŝajne plej elstaras lastatempe.

Nome de VEA, ni elkore dankas al s-ino Huyen Trinh pro ŝia helpo aranĝi la prelegon, al esperantistoj, kiuj ĉeestis, kaj tiuj, kiuj ĉiam subtenas agadon de la Asocio. Via subteno kuraĝigas nin daŭre aktivi en la Esperanto-movado malgraŭ malfacilaĵoj kaj obstakloj.

# Klerige: KER-ekzamenoj kun Katalin

Katalin Kováts, komisiita de UEA, estas la ĉef-organizanto de la KER-ekzamenoj. Dum 10 jaroj sukcese ekzameniĝis jam 2407 personoj el 75 landoj (https://edukado.net/prie/sinprezento/).

La ekzamenoj okazas dum grandaj aranĝoj kun la ĉeesto de la ekzamenantoj, tamen pli oftas KER-sesioj en urboj, kluboj, kie la organizajn taskojn devas fari lokaj respondeculoj.

Nun Katalin informos volontulojn, por ke ili povu facile okazigi ekzamenojn en sia loko. Gravas tia formado precipe kiam temas pri la Tutmonda Ekzameno, kiam jare unufoje, samtage, en dekoj da landoj tutmonde estas sesioj, kiel ankaŭ ĉi-jare estos en novembro.




Vi povos ekscii detalojn ankaŭ pri nova plano de la ekzamena sistemo, nome, ke tre baldaŭ eblos ekzameniĝi ankaŭ tute rete, eĉ individue en la propra hejmo. Kompreneble por tio estos rigoraj teknikaj kondiĉoj, sed tamen ekestos la okazo, kiun oni delonge atendas. La programo estas bona okazo starigi demandojn ankaŭ pri la lanĉota nova nivelo, C2.

Pliaj detaloj kaj ligiloj ĉe:
https://revuoesperanto.org/ker_vk

# TEJO prezentita dum la Virtuala Kongreso




La 7-an de aŭgusto, la prezidonto de TEJO Charlotte Scherping Larsson kaj la kasisto Mung Bui Feliĉa prezentis la agadon de TEJO dum la Virtuala Kongreso kaj respondis al pluraj demandoj de la spektantoj.

Vi povas (re)spekti la videon de la kunveno en la sistemo de la VK (nur por la partoprenintoj de la kongreso):
https://mallonge.net/5m

# La Tago de Afriko kadre de MondaFest'



Adjévi Adjé

Okazos evento kadre de la MondaFest' de UEA, por kune celebri la kontinentan movadon dimanĉe, la 23-an de aŭgusto 2020.

Temas pri 6-hora renkontiĝo kun la celo ligi interrete esperantistojn el diversaj mondpartoj, por ke ili povu interkonatiĝi kaj konatiĝi kun diversaj Esperanto-atingoj en Afriko tra viva prezentado de mallongaj agadraportoj faritaj de afrikaj landaj asocioj, kluboj kaj organizaĵoj. Estos ankaŭ prelegoj de afrikaj aktivuloj, forumo pri Afriko, afrikaj muziko, filmeto kaj aliaj interesaĵoj.

La organizantoj de la Tago estas la membroj de la Afrika Komisiono de UEA en sinergio kun enkontinentaj aktivuloj kaj landaj asocioj. La aranĝo estas subtenata ankaŭ de la estrarano de UEA pri Afriko.

Plej probable la Tago de Afriko estos la plej granda renkontiĝo el ĉiuj ĝis nun okazintaj en Afriko, ĉar registriĝis por partopreni en ĝi jam ĉ.100 esperantistoj de pli ol 30 landoj. Bonvolu ankaŭ aliĝi al TA per https://forms.gle/1LnjCCLDgFDsiPhF9

Korea Esperanto-Asocio eldonis individuajn poŝtmarkojn pri "La 100-jara jubileo de Korea Esperanto-Asocio."







# La Asocio Nova Familio

Kadre de MondaFest', dum la Virtuala Kongreso de Esperanto okazis prezento pri la **Asocio Nova Familio** (ANF), Goma, Kongolando. Ĝi helpas al georfoj, kiuj perdis siajn gepatrojn pro la militoj (jam pli ol 20 jarojn) en tiu regiono. ANF, kreita en 2004, por la ĉefa celo lukti kontraŭ la malriĉeco kaj realigi projektojn, protektas kaj sekurigas georfojn ĉe gastigantaj familioj, donas manĝon, sendas ilin al lernejo kaj instruas al ili Esperanton, kiun ili tre ŝatas, ĉar ĝi estas bela lingvo, facila, ĝi unuigas la homajn korojn, pacigas, amikigas kaj precipe donas al ili esperon por la estonteco en la spirito de Zamenhof.




Dum la pandemio ANF kontrolas, ĉu ĉiuj familioj havas maskojn kaj lavabojn kaj ĉu oni tenas la socian distancon. Teamo vizitas ĉiujn georfojn en iliaj hejmoj kaj klarigas al la familioj kaj infanoj pri la kronviruso kaj kiel agi. La lernejan kotizon devas pagi la gepatroj, kiujn la georfoj ne havas. Pagendas jare po 100 € (70 en baza lernejo), 200 € (50 en mezlernejo), 600 € (10 en universitato)

Kiel vi povas helpi:

– Donaci monon unu foje aŭ „adopti" unu (aŭ plurajn) infano(j)n kaj donaci monon regule al tiu(j)

– Pludoni la informojn al aliaj homoj kiuj povas donaci monon, baldaŭ sub https://www.facebook.com/AsocioNovaFamilio (konstruata)


Vi povas sendi monon pere de GoFundMe:
https://gf.me/u/ynanb7
aŭ pere de PayPal al: willdnorton@gmail.com
Ankaŭ por kontakti nin.

Videblas momente filmetoj en jutubo je: https://www.youtube.com/playlist?list=PLQsPYNciR6l-NvlR3SHEqxBiLmltqqdo_5

*Betti Maul*

Vi povas esti aŭtoro de la *Festivala Kuriero* kaj la Reta Revuo! Por kontribui, skribu al la redakcio *redakcio@revuoesperanto.org*

# Virtuala Kongreso de Esperanto kalejdoskope



Aŭtora Momento kun Spomenka Štimec



Aŭtora Momento kun Zdravka Metz



Internacia Kongresa Universitato: Geopolitiko, remalkovrita fako



Aŭtora Momento kun Lode Van de Velde



Koncerto: Kaŝi


Montrealo: la kongresa urbo de 2022



Aŭtora Momento kun C. Minnaja



Libroj de la Jaro: Flandra Esperanto-Ligo

*Dankon al Rob Moerbeek, kiu helpis provlegi tiun ĉi numeron*